



Boletín

nº 439 Julio - Septiembre 2022



Asociación de utilidad pública

Boletín

Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio
aperanta de 1949
Numero 439

Redakto-skipo
Direktado kaj kompostado: Ángel Arquillos L.
Revizio: J. A. del Barrio

Retadreso de la bulteno:
bulteno@esperanto.es
angelarquillos@gmail.com

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la respektivaj aŭtoroj

* La redakcio rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn

*Republikado de enhavo nur permesita kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro

Financaj aferoj: financoj@esperanto.es

Aliaj aferoj (escepte de financaj):
admin@esperanto.es

Hispana Esperanto-Federacio *Federación Española de Esperanto*

Rodríguez San Pedro, 13, 3º, 7
ES-28015 Madrid
admin@esperanto.es
Bankokonto BBVA: ES85 0182 1252 31
0204011961
TRIODOS BANK: ES24 1491 0001 2420 0926
4025
Poŝtelefono: +34 638 547 104
Telefono: +34 914 468 079 (bv. lasi mesaĝon
en la aŭtomata respondilo)

Estraro

Prezidanto: Ángel Arquillos López
Vicprezidanto: Alberto Granados Orcero
Sekretario: Manuel Parra
Vicsekretario: Isidoro Ortega López
Kasisto: Jesús M. García Iturrioz
Voĉdonantoj: Vicente Manzano (Viko)
“ Ana Manero

Prezidanto HEJS
kaj voĉdonanto: Guaroa Emmanuel González.

Presejo: Gráficas Notivol (Zaragoza)
DL: M-39811-2012 / ISSN 2444-8400

SALUTVORTOJ

Karaj gelegantoj de Boletín,

Iom post iom malaperas la buŝmaskoj kaj en la mondo revenas la bonaj kutimoj vojaĝi kaj renkontiĝi ie ajn kun la ideo praktiki la internacian lingvon, ĉar nia celo estas disvastigi ĝin kaj pro tio en la urbo Sevilo oni laboras en la preparo de la venonta Hispana Kongreso, kiu surprizos nin, ĉar temas pri kulturo kaj instruado ne nur pri Esperanto, kaj por ke ni ĉiuj konatiĝu kun la urbo Sevilo.

Boletín rezervas plurajn paĝojn por rakonti al vi kun detalo, la historion de la urbo, kiu estas pli interesa ol vi imagas, kara leganto.

Denove ni devas prokrasti la publikigon por faciligi al la kontribuantoj, la pezan laboron verki bonajn tekstojn, ĉar ili ne estas ĵurnalistoj kaj mi fidus je via kompreno, ĉar valoras la penon.

Mi profitas la okazon peti unu plian fojon vian valoran kontribuon por la venonta bulteno, ĉar finfine, la informilo apartenas al ĉiuj kaj iamaniere la novaĵoj temas pri Esperanto, t.e. pri ni kaj nia agado kiel membroj de la Federacio kaj ĉi tie estas spaco por ĉiuj, kiuj volas esprimi siajn zorgojn kaj havas ion novan por kontribui al plifortigo de la Movado.

Ángel Arquillos
Redaktoro

ENHAVO

Salutvortoj	1
Kunsidis la Estraro	3
Sevilo, ĉefurbo de HEF en 2023!	4
Nova prezidanto de TEJO	7
HEF bonvenigas la novan prezidanton de HEJS	9
24-an de oktobro UN-TAGO	10
Omaço al Félix Díez Mateos	12
Pri grupoj kaj asocioj	13
La trajno de la 40-a jaroj	20
La heredaĵo de la Universala Frateco	22
Poezia Angulo	24
La Stranga Angulo, ĉapitro 6a	27
La 89a Itala Kongreso de Esperanto	29
IKIKO 2022 okazas plurloke!	30
Iom da Matematiko (8)	31



SUKCESA MOVADA FOIRO DUM LA UNIVERSALA KONGRESO DE MONTREALO 2022

Kiel kutime HEF partoprenis en la Movada Foiro, ĉi.foje nia samideano Carlos G. Spinola kaj lia edzino Concepción, faris tre bonan propagandon por nia federacio kaj ĉefe por la venonta Hispana Kongreso de Esperanto okazonta en la urbo Sevilo, de la 12a ĝis la 15a de oktobro.

De ĉi-tie mi profitas la okazon inviti vin al la grava evento okazonta en oktobro, sed ne timu, la vetero en Sevilo estas tre agrabla kaj la beleco de la ĉefurbo de – Andaluzio valoras la penon.

La redaktoro.

KUNSIDIS LA ESTRARO

La 21an de septembro virtuale kunsidis la estraro de HEF. La tuja kialo por fari tiun ĉi kunsidon estis la ŝanĝo de la prezidanto de la junulara sekcio HEJS. Tial ke, laŭ tradicio, la prezidanto de HEJS fariĝas membro de la estraro de HEF, necesis formaligi la ŝanĝon. Do, eliras William Guerrero kaj eniris la estraron Emmanuel González. Tamen, ĉi nomumo estas provizora ĝis (mal)konfirmo fare de la Ĝenerala Kunveno. Al William ni dankas pro sia plurjara dediĉo. Emmanuel (Manu) estas juna madridano kiu faris volontulan servon por TEJO (en Roterdamo) kaj por la loka E-grupo de Tuluzo.

Ankaŭ ni ĵetis rigardon al la progreso de la prepar-laboroj por la venontjara hispana kongreso. Nuntempe la sevilaj samideanoj intertraktas kun la municipaj instancoj por atingi senpagan kongresejon. La datoj estos de la 12^a ĝis la 15^a de oktobro 2023.

Alia punto temis pri la publika agado okaze de la Eŭropa Tago de Lingvoj (26^a de septembro). Ni decidis dissendi mallongan komunikon al la amaskomunikiloj. Ĝin publikigis la reta ĵurnalo Tercera Información <https://www.tercerainformacion.es/articulo/cultura/26/09/2022/federacion-espanola-de-esperanto-apoyamos-un-multilinguismo-justo-en-europa/>

Cetere, la estraro sciiĝis pri la marŝo de la UNED-kursoj. En la lernojaro 2021-2022 estis entute 42 lernantoj, duono el ili en la nivelo A2 kaj duono en la nivelo B1. Deĵoras tri instruistoj: unu por ĉiu nivelo plus la konversaci-gvidanto (tutor de conversación) por ambaŭ niveloj.

La sekretario

SEVILO, ĈEFURBO DE HEF EN 2023!

La kanto diras, ke "Sevilla havas specialan koloron", sed la vero estas, ke ĝi ne nur havas unu koloron, sed tutan mozaikan ĉielarkon. Ĉiu angulo havas malsaman personecon kaj ĉiu strato kaŝas surprizon. Mi vizitis la urbon en 2014 kaj vere ne sciis multe pri ĝi, nur pri la ĉefaj vidindaĵoj kaj iom supraĵe pri la historio, sed la elkora kaj plaĉa gastamo de ĝiaj lokaj esperantistoj kaj ties ĉiĉeronado malkovris al mi ĉi tiun mirindan urbon. Nun, kiam andaluzaj samideanoj sin preparas por gastigi la plej gravan renkontiĝon de hispanaj esperantistoj, estas bela kaj praviga kialo reveni plian fojon al ĝi.

Sevilo estas bela kaj unika urbo kien ajn oni rigardas. Ĝia lumo faras ĝin magia, ĝiaodoro de oranĝa floro neforgesebla, kaj ĝia etoso ankaŭ estas memorinda. Ĝi havas arton, renomajn kuirartojn, unikajn kulturojn kaj fascinan historion, kiu reflektiĝas en la historiaj monumentoj.

Sincere dirite, ĝi estas inter la plej belaj kaj ĉarmaj urboj kiuj mi iam vizitis kaj se vi jam vizitis ĝin plejverŝajne same opinias. Tamen, dum la nacia kongreso oni plu malkovros ĉi tiun urbon per aliaj okuloj kaj en esperanta amikeca atmosfero ĝia ĝuado estos neforgesebla.

Kiam mi planas vojaĝon al iu certa difinita urbo aŭ loĝloko tuj serĉas informojn pri la historio, kulturo kaj se estas esperanto-klubo en ĝi. Tial, mi volas doni al vi plej gravajn informojn pri Sevilo.

La originoj de la urbo Sevilo troviĝis en insulo ĉe la rivero Gvadalkiviro, en la nuna regiono Alfalfo. La origina nomo de la loĝloko estis Spal. Nune ekzistas kontraŭdiroj inter la historiistoj pro duboj rilate al ĝia fondaĵo fare de la fenicoj aŭ de la tartezoj. Por defendantoj de la fenica hipotezo, Tartezo ne estis vilaĝo sed la nura nomo donita de grekaj fontoj al la sudokcidenta duoninsula regiono.

Jam meze de la 1-a jarcento a.K., la tiama Sevilo, nomata Hispalis, kalkulis je murego kaj forumo romiaj kun komerca havena aktiveco. Post la restrukturado de la Romia Imperio, la juna kaj vigle komerca urbo iĝis ĉefurbo de unu el la kvar konventoj de Baetica, senata provinco kies ĉefurbo estis Kordubo. La areo ĉirkaŭ la nuna placo Alfalfa konstituis la renkontiĝejo de la cardo kiu trairis de nordo al sudo, de la nuna preĝejo Sankta Katarina ĝis la strato Abades kaj la dekumano kiu trairis de oriento al okcidento ekde la nuna preĝejo Sankta Stefano en la strato Águilas ĝis la placo de la Savinto. En tiu ĉi zono troviĝis la forumo el la romia imperia epoko, kiu enhavis templojn, termobanejojn, publikajn konstruaĵojn kaj bazarojn. La kristanismo frue atingis la urbon kaj en la 3-a jarcento estis martirigitaj la fratinoj Sankta Justa kaj Rufina (unu el la nunaj gepatronoj de la urbo), laŭ la legendo, pro nevolo adori la diinon Astarto.



Dum la 16-a jarcento la urbo spertis grandan disvolviĝon kaj transformiĝon, kiu ebligis la konstruadon de kelkaj el la plej gravaj konstruaĵoj de la historia urboparto. La urbo iĝis tre bunta helpante tion al la florado de la belartoj, kiuj ludis gravan rolon en la hispana ora epoko. Elstaris la sap-fabrikejo, la lana kaj la silka artoj.

Klimato

La klimato de Seviljo estas mediteranea leĝere kontinenta, kun varia pluvado, sekaj someroj kaj ekstreme varmegaj kaj mildaj vintroj kaj foje pluvaj kiuj koncentrigas pli ol duonon de la jara pluvado. Laŭ la klimata klasifiko de Köppen, ĝi apartenas al la klimato Csa. La jara mezuma temperaturo estas 19.2°C, unu el la plej grandaj de Eŭropo kaj la plej alta el la duoninsulaj ĉefurboj. Januaro estas la plej malvarma monato kun mezumaj temperaturoj de 5,7 °C; kaj julio la plej varma, kun mezumo de ĉiutagaj temperaturoj de 36,0 °C. Plurfoje jare la 40 °C estas superitaj. Pro ĝiaj someraj mezumaj temperaturoj, temas pri la provinca ĉefurbo plej varma en Hispanio.

Kulturo:

Seviljo estas tutmonde rekonata pro ties bunta kulturo kiu ampleksiĝas al plej diversaj manifestiĝoj kiuj povas esti teatro, dancoj, muziko kaj la fama Sankta Semajno. Flamenko estas la melodio de la urbo, kaj ĝi estas deklarita monda heredaĵo de Unesko ekde 2010. Aliaj du aranĝoj sevilaj kun internacia prestiĝo estas la procesioj de Sankta Semajno kaj la Aprila Foiro. la Sankta Semajno estas fenomeno ne nur religia sed ankaŭ kultura, arta kaj folklora, pri kies organizado precipe okupiĝas dekoj da kunfrataroj kun siaj propraj religiaj bildoj, kostumoj, diversaj itineroj tra la urbo kaj muziko kaj preĝaroj akompanas la sanktulojn de preĝejo al preĝejo.

Seviljo ankaŭ estas hejmo de multnombraj interesaj muzeoj ofte pri specifa temo. Inter la plej gravaj kaj vizitataj muzeoj troviĝas la muzeo pri Belartoj, muzeo pri nuntempa arto kaj Ĝenerala Arkivo de Indioj sed aliaj kiaj muzeo de la ĉaro, muzeo de la armeo kaj muzeo de la flamenka danco ankaŭ estas aprezataj kaj vizitindaj por pli konatiĝi kun la karaktero kiu kreis kaj plu kreas la urbon.



Kuirarto:

La kuirarto estas tre kondiĉigita de la lokaj temperaturoj ĉie tra la mondo kaj Sevililo ne estas la ununura escepto. Ni povas trovi kontrastojn inter ĝiaj printemp-someraj kaj aŭtun-vintraĵoj, adaptitaj al la foje draste ŝanĝiĝantaj temperaturoj. Malgraŭ tiuj ĉi kontrastoj ĝin karakterizas la sobereco kaj simpleco kaj ĝenerale ĝiaj pladoj ne estas komplike ellaborataj sed venas rekte el la mediteranea kuirarto.

Kiam someras kaj la suno frape karesas la urbon, plej rekomendindas mendi en multaj el ĝiaj tipaj restoracioj la andaluzan gazpaĉon (jes, mi volas klarigi ke ekzistas aliaj gazpaĉoj, ekz. la ekstremadura), la rusan salaton, diversajn malvarmajn pladojn nomatajn "salpikono" (kutime haketita bovaĵo kun vinagro, cepo kaj salo) kaj variajn salatojn.

Fama manĝaĵo ankaŭ estas la fritita etfiŝo, plado kiu konsistas el fritado de etaj fiŝoj farunkovritaj kun abunda olivoleo, kutime manĝata dum la tuta jaro. Tiel, tre oftas la gustumado de ampleksa gamo da kolbasoj, precipe, montara ŝinko, diversaj fromaĝoj kaj la tradicia seranito, andaluza sandviĉo el sevila origino.

Kiam la suno ripozas kaj ne tiel frape karesas la urbon, sevilanoj ŝatas manĝi, inter kelkaj aliaj manĝaĵoj, la andaluzan kocidon kiu konsistas el kikeroj kaj "pringá" (diversaj kolbasoj, viando kaj tocino), la spinacoj kun kikeroj, la bovo-vosto, la tripoj je andaluza maniero, la ovoj "flamenkostilaj", la "spicitaj terpomoj" kaj la supo el haketitaĵoj.

Inter la trinkaĵoj plej tipaj elstaras la "somera ruĝa vino" (ruĝa vino kun karbonata akvo), la biero, la ŝereo kaj la manzanilo de Sanlúcar.

Same kiel en la cetero de Andaluzio, elstaras en Sevililo la tapoj. La tapoj estas tre malsamaj kaj en ilia ellaborado intervenas la kreemo kaj kreivo de ĉiuj kreantoj.

Urba heredaĵo:

Sevililo estas la urbo kun pli da monumentoj katalogitaj en Eŭropo, pro kio ĝi elstaras ĉirilate. Inter ĝiaj monumentoj rimarkindas la «Katedralo, la Giraldo, el Alkazaro kaj la Arkivo de Indioj», kiuj estis deklaritaj Monda heredaĵo de Unesko en 1987, samkiel la «Ora Turo aŭ la Placo de Hispanio», kiuj estas kandidatoj al tiu internacia rekono ekde 2013. Ĝi posedas unu el la plej grandaj historiaj urbocentroj plej ampleksaj de Hispanio, el ĉirkaŭ 335 hektaroj. Same menciindas ĝia malnova urboparto, la plej granda de Hispanio kaj unu el la tri plej grandaj de Eŭropo kune kun tiuj de Venecio kaj Ĝenovo, el 3,94 kvadrataj kilometroj.

La Placo de Hispanio estas unu el ĝiaj plej novaj sed same trezora havaĵo de la urbo. Ĝin vizitas miloj da turistoj jare kaj eĉ aperis en la mondfama serio "Ludo de Tronoj". Certe dum la nacia kongreso eblos viziti kaj admiri la urbon mane de la lokaj esperantistoj kaj de aliaj amikoj venintaj ne nur el Hispanujo sed ankaŭ el aliaj landoj, altiritaj de la urbo kaj ties kultura allogeco kune kun ĝiaj imponaj monumentoj, ĉarma historia urboparto, la simpatio de la sevilanoj kaj la frandeco de la loka kuirarto. La Nacia Kongreso atendas vin, Sevililo atendas vin!

Andy García

NOVA PREZIDANTO DE TEJO



Albert Stalin Garrido naskiĝis la 30an de novembro 1997 en la urbo Valenzuela, norde de la ĉefurbo Manila. Li estis la tria el kvar gefratoj. Nature lingvemulo, li jam de infanaĝo parolis tri lingvojn: la tagalogan kaj la anglan, siajn denaskajn lingvojn, kaj la cebuan, kiu estis la denaska lingvo de liaj gepatroj. Li ankaŭ iomete lernis la hispanan. Li finis elementan lernejon en 2010 kaj poste ekstudis en la Scienca Gimnazio de Valenzuela, la plej prestiĝa publika gimnazio en la urbo, kie li aktivis kiel skolto kaj studenta ĵurnalisto kaj prezidis la studentan filion de la Ruĝa Kruco.

En marto 2013, kiam li ankoraŭ estis 15-jara, li hazarde trovis Esperanton per neesperantista paĝo en Facebook, kiu menciis kelkajn faktojn pri Esperanto. Li tuj poste komencis eklerni la lingvon aŭtodidakte

per Lernu (lernu.net), kie li ankaŭ trovis aliajn filipinanojn, kiuj same parolis aŭ lernis ĝin. Ĝuste tiam ekzistis nek movado nek kursoj en la lando, kvankam malpli ol jardekon antaŭe (en 2006) oni fondis la Esperanto-Asocion por Filipinoj (EAPF), kiu tamen inter 2009 kaj 2011 ĉesis aktivi. Poste, en majo, li starigis Facebook-grupon por filipinaj esperantistoj kaj en junio, trapasis la superan retan ekzamenon de Lernu, per kio li ricevis lian unuan ekzempleron de revuo "Esperanto" kiel donacon de Universala Esperanto-Asocio (UEA) al tiuj, kiuj trapasis tiun ekzamenon.

La postaj monatoj vidis la restarigon de la junulara movado en Filipinoj sub lia gvido. La 19-an de septembro 2013, li, 15-jara, kune kun Carl Joshua Quines (13-jara) kaj Jecel Marie Manabat (16-jara), cetere ĉiuj studentoj de la sama gimnazio, fondis la Filipinan Esperantistan Junularan Asocion (FEJA), kiun ili en 2014 renomis Filipina Esperanto-Junularo (FEJ). La iniciaton ili faris kun la subteno de la tiama ĝenerala direktoro de UEA Osmo Buller, kiu ankaŭ donacis al ili kelkajn librojn, Esperantan flagon, kaj membrecon en UEA. Li alprenis gvidan rolon kiel la Ĝenerala Sekretario kaj organizis malgrandajn kursojn kaj lokajn renkontiĝojn. Fine, en januaro 2016 li transprenis la novkreitan postenon de Prezidanto.

En 2014 komenciĝis lia aktiveco en Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO). Li unuafoje aliĝis al ĝia Komitato en junio kiel reprezentanto de individuaj membroj kaj servis ĝis 2016. Kiam FEJ oficiale iĝis nova landa sekcio de TEJO en januaro 2017, li rekomitataniĝis kiel reprezentanto de FEJ. En la TEJO-Komitato li estis forta pledanto de tutmondeco de TEJO, ofte diskutante kiel la organizo povus pli aktive agadi por esti pli videbla al ĝiaj ekstereŭropaj landaj sekcioj kaj samtempe antaŭenigante pli fortajn rilatojn inter landaj junularaj organizoj en Azio. Samtempe li partoprenis en pluraj organoj en TEJO: li estis membro de la Elekta Komisiono kaj de pluraj aliaj komisionoj kaj interesgrupoj.

Post lia 18-jariĝo en 2015, li spertis siajn unuajn internaciajn vojaĝojn al esperantistaj renkontiĝoj. Dank' al la invito de japanaj esperantistoj li partoprenis en junio 2016 en la 65-a Kanto Esperanto-Kongreso (Tokio) kaj la 64-a Kansaja Esperanto-Kongreso (Sakai), kie li gastprelegis pri la Esperanto-movado en Filipinoj. Li poste lanĉis sukcesan donackampanjon por partopreni en la 8a Azia-Oceania Kongreso (AOK) en Quanzhou, Ĉinio en novembro de la sama jaro. Julie de 2017 li iris al sia unua Univerŝala Kongreso (UK) en Seulo, kie li salutis nome de Filipinoj kaj trapasis la C1-nivelan KER-ekzamenon, interalie. Li ĉeestis en pliaj renkontiĝoj: en du Japanaj Esperanto-Kongresoj en Yokohama kaj Nara, Japanio (2017 kaj 2018, respektive), la Trilanda Kongreso en Bekasi, Indonezio (2018), la 9a AOK kaj en la 37a Komuna Seminario de Sudorientaziaj Esperantistoj en Da Nang, Vjetnamio (2019).

Krom agadi en la landa kaj internacia niveloj, li ankaŭ agadis en la universitato, kie li studis. En 2014 li iris studi en la Universitato de Filipinoj-Diliman, la plej prestiĝa publika universitato en la lando, kie li unue studis inĝenieradon sed poste decidis ŝanĝi sian fakon al geografio. Li tie komencis aktivi politike kaj iĝis membro de *Alay Sining*, studenta klubo por maldekstraj artistoj. Li ĉeestis manifestaciojn kaj ĉian politikan kaj socian agadon en kaj ekster sia universitato. Estante tre internaciema junulo, li membriĝis en la Hispana Klubo (Círculo Hispánico) kaj la Filipina-Japana Amikeca Klubo kaj samtempe deĵoris kiel volontulo en la universitata Ofico pri Internaciaj Ligoj, kie li subtenis interŝanĝajn studentojn. Li ankaŭ havis bazajn klasojn pri la japana, la mandarena, kaj Latino. La 26-an de julio 2018, okaze de la Esperanto-Tago, li kunfondis post sukcesa varba kampanjo la Esperanto-Societon de la Universitato de Filipinoj, ankaŭ oficiale konata kiel UP Esperanto-Societo kaj mallongigita kiel "UP Esperas." Entute estis 16 originalaj membroj, inter kiuj li elektiĝis kiel prezidanto. La klubo estis oficiale registrita en la universitato kaj komencis esti konata inter studentaj rondoj. En 2019, li diplomiĝis de la universitato.

Inter 2019 kaj 2021 li profesie laboris kiel subtena oficisto por moviĝeblo de internaciaj studentoj. En lia unua laborejo li helpis samlandanojn, kiuj deziris studi en Aŭstralio, Kanado, kaj en aliaj popularaj landoj por studado; en lia dua laborejo, li helpis homojn tra Azio, kiuj deziris la samon. Samtempe li ankaŭ deĵoris kiel aganta redaktoro de "Esperanto en Azio kaj Oceanio," la trimonata bulteno de la Azia-Oceania Komisiono de UEA.

Dum la pandemio, li komencis pli aktive agadi por FEJ kaj TEJO rete. Li organizis por FEJ retajn renkontiĝojn kaj gvidis la okazigon de ĝia 7-jariĝo en septembro 2020, kiam la organizo adoptis novan statuton kaj reelektis lin kiel prezidanton. Fine de 2020 li estis alelektita estrarano kaj anstataŭis Robert Nielsen, estrarano pri landa kaj faka agado (LFA) kiu pli frue demisiis. Li plenumis la rolon dum 9 monatoj, kaj por la nova mandato estis elektita la 1a Vicprezidanto en julio 2021; krom LFA, li alprenis respondecon pri Edukado, Scienco, kaj Universitata Agado. Tuj poste, en oktobro, li translokiĝis al Madrid, Hispanio, kie li nuntempe partoprenas en programo de la hispana ministerio pri edukado kaj instruado la anglan en publika gimnazio en Las Rozas de Madrid. Loĝante en Eŭropo li vojaĝis al pluraj landoj kaj partoprenis en pluraj fizikaj renkontiĝoj kaj trejnadoj, interalie en la 9-taga Trejnu Novajn Instruistojn (TnT) en Francio, kie li iĝis oficiala TEJO-Trejnistoj.

Li ankaŭ partoprenis en la 80a Hispana Kongreso en Comillas (Kantabrio), la 39a Kataluna Kongreso en Castelldefels (Katalunio), kaj en la 78a Internacia Junulara Kongreso (IJK) en Nederlando.

Post unu jaro kiel vicprezidanto, li estis elektita de la Komitato de TEJO kiel la nova Prezidanto de la organizo. Li gvidas 9-kapan tre internacian estraron, kiu konsistas el junuloj el Filipinoj, Hispanio, Francio, Pollando, Britio, Brazilo, Argentino, Singapuro, kaj la Demokratia Respubliko de Kongo. Li respondecas, krom pri ĝenerala gvidado de la organizo, ankaŭ pri: rilatoj kun UEA kaj la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), kun kiuj li interkonsentis pri triflanka kunlaboro pri edukado en majo 2022; pri Edukado, Scienco, kaj Kulturo (ESK); kaj pri Kongresoj, en kiu li kunordigas la organizadon de la 79a IJK kiu okazos en Lignano Sabbiadoro, Italio en aŭgusto 2023. Krom en TEJO, FEJ, kaj UEA, li ankaŭ membras kaj aktivas en Skolta Esperanto-Ligo (SEL) kaj Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT). Krom liaj esperanta kaj profesia vivoj, li ŝatas vojaĝi tra Hispanio, manĝi diversajn manĝaĵojn, spekti filmetojn, kaj uzi la publikan transporton.

HEF BONVENIGAS LA NOVAN PREZIDANTON DE HEJS



Li estas Guaroa Emmanuel González Cuevas, mallonge, Manu. Li kreskis en Madrido sed origine li devenas el Dominika Respubliko. Li havas 27 jarojn kaj studis Ekonomion kaj nun studas Internaciajn Rilatojn. Li esperantitiĝis antaŭ unu jaro kaj duono ĉar li komencis volontuli en la Esperanto-Kultur-Centro de Tuluzo, Francio. Danke al tiu programo li povis partopreni en pluraj eventoj, kiel IJK, SEMEO, SES, kunorganizi malfermajn esperanto-kursojn, informado pri Esperanto, kaj krei materialon por la radioelsendo de la asocio en Tuluzo. Antaŭe, li, dum pluraj jaroj, partoprenis en la asocia movado kaj li estis la prezidanto de la Madrida Junulara Konsilio.

24-an DE OKTOBRO, UN-TAGO

La Tago de Unuiĝintaj Nacioj festas la datrevenon de la ekvalido, la 24-an de oktobro 1945, de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj (UN). Per la ratifo de ĉi tiu dokumento, la plej granda parto de siaj subskribantoj, inkluzive la kvin konstantaj membroj de la Sekureca Konsilio, la Ĉarto oficiale ekvalidiĝis.

Do, la 24-an de oktobro, oni festas la UN-Tago, ĉar la 31-an de oktobro de 1947, la Ĝenerala Asembleo, per Rezolucio 168, deklaris ke tiu dato estas la datreveno de la valideco de la Ĉarto de UN kaj ke oficiale oni deklaras la UN-Tago. Krome, en 2020 la Ĝenerala Asembleo rekomendis al la membroŝtatoj festi tiun tagon kiel oficialan feston. Tamen, fakte, malmultaj landoj plenumas tiun proponen.

Sed kio signifas tiuj datrevenoj? Kompreneble, tio dependas de la kialo de iu fiksita festo. Temas ofte pri ĉiuaspektaj malkovroj, bataloj, historiaĵoj k.t.p. Plej ofte ĉiu evento havas *antaŭaĵojn, kaj sekvojn*, kaj UN ankaŭ havas ĝin.

Estante UN porpaca internacia organizo, ĝia antaŭaĵo estis la Societo de Nacioj aŭ Ligo de Nacioj, kiu naskiĝis post la unua mondmilito, per la Traktato de Versajlo de 28 de junio 1919, kie oni subskribis la armisticon de la milito. Tiu nova organizo funkciis oficiale ekde 1920 ĝis 1946, kaj ni diras oficiale, ĉar fakte la Ligo de Nacioj ne povis roli sian celon, ĉar en la tridekaj jaroj komenciĝis militaj konfrontoj kaj interlandaj streĉitecoj ĝis septembro de 1939. De tiam ĝis 1945, ĉi tiu organizo estis nur spektanto ekde sia sidejo de Ĝenevo.

Gravaj okazintaĵoj, kiel la nealiĝo de Usono al la organizo, la forpelo de Sovetunio kaj Turkio, la retiriĝo de Japanio, Italio kaj eĉ Germanio en 1933, ĝuste kiam Hitlero suriris la regadon, kaŭzis la kolapson de la Ligo de Nacioj.

Finiĝinta la dua mondmilito, en 1945, post teruraj konsekvencoj, la ŝtatoj bezonis krei alian organizon multe pli forta kaj efika ol la Ligo de Nacioj. Post pluraj gravaj kunsidoj, en aprilo de 1945, (monato antaŭ ol la fino de la mondmilito), reprezentantoj de 50 ŝtatoj kunsidis en Sankta Francisko (Usono) kaj ellaboris Ĉarton enhavanta 111 artikolojn, kaj monatojn poste, la 24-an de oktobro, validiĝis la teksto, post la ratifo de granda parto de la partoprenantaj landoj.

La celoj de UN laŭ la unua artikolo de la Ĉarto estas *konservi la pacon kaj sekurecon, evoluigi inter la nacioj amikajn rilatojn, realigi internacian kunlaboradon kaj esti centro por harmoniigi la klopodojn de la nacioj por atingi tiujn komunajn celojn*.

Dum sia laboro, UN ludas kernan rolon en la internacia komunumo por mildigi konfliktojn kaj internaciajn problemojn, per siaj porpacaj operacioj, sendante blukaskulojn, estante sidejo de internaciaj konferencoj kaj kadro de multnombraj kaj multflankaj traktatoj, protektado de la refuĝintoj, zorgante pri la medio, stimulant la edukadon por ĉiuj kaj la forigon de malriĉo kaj malsato, protektante la marfundojn kaj la eksteran spacon per traktatoj, la tutmondan evoluon kaj la internacian leĝaron pri homaj rajtoj.

Por plenumi tiujn agadojn, ne nur funkcias la organoj de UN (Asembleo, Konsilio, Sekretariulo, EKOSOK, Internacia Kortumo), sed ĉefe la Fakaj Institucioj de UN, kiuj, per interregistaraj interkonsentoj plenumas siajn specifajn celojn. Temas pri institucioj, kelkaj pli konataj, kiel Internacia Monfonduso, Organizaĵo de UN por la Nutraĵo, kaj Agrikulturo (FAO), Organizaĵo de UN por Edukado, Scienco kaj Kulturo (UNESKO), Internacia Labororganizo, Internacia Mara Organizo, Tutmonda Metereologia Organizo, Internacia Sanorganizo, Metereologia Organizo, Universala Poŝta Unio, Tutmonda Turisma Organizo, k.t.p. Ili havas propran sidejon malsimilan al la sidejo de UN, kaj siajn proprajn membroŝtatojn, en malsimilaj urboj, kaj kompreneble, ili havas siajn proprajn celojn.

Krome, rilate UN-Tago-n ni bezonas ankaŭ koni la estontecon de Unuiĝintaj Nacioj. Krom fiksitaj specifaj jardekoj, ni devas emfazi la Jarmilajn Evoluigajn Celojn kiuj estis aprobitaj en septembro 2000, kiujn 192 membroŝtatoj de UN, konsentis plenumi antaŭ ol 2015.

Sed ankoraŭ pli avangarda estis la aprobo per la Ĝenerala Asembleo de UN, la 8-an de septembro 2015, de la Celoj por Daŭripova Evoluigo, validaj ĝis 2030. Tiu nomata Agendo 2030 estas ambicia kaj per siaj 17 Celoj kaj subceloj, estas la bazo de la evoluiga strategio de UN por *“forigi malriĉon ĉie, en ĉiuj ĝiaj formoj; forigi malsaton, atingi manĝo-sekurecon kaj pli bonan nutraron, kaj antaŭenigi daŭripovan agrikulturon; garantii sanajn vivojn kaj kreskigi bonfarton por ĉiuj homoj en ĉiuj aĝoj; garantii inkluzivan kaj egalecan bonkvalitan edukadon, kaj plivastigi por ĉiuj la ŝancojn por tutviva lernado; atingi egalecon inter la seksoj kaj plivastigi la decidopovon de ĉiuj virinoj kaj junulinoj; garantii al ĉiuj homoj haveblon kaj daŭripovan mastrumadon de akvo kaj sanitaraj sistemon; garantii al ĉiuj homoj alireblon al pagebla, fidinda, daŭripova kaj moderna energio; antaŭenigi daŭran, inkluzivan kaj daŭripovan ekonomian kreskon, plenan kaj produktivan dungitecon, kaj bonkondiĉan laboron por ĉiuj homoj; konstrui elteneman infrastrukturon, akceli inkluzivan kaj daŭripovan industriigon kaj kultivi inventemon; redukti malegalecon ene de landoj kaj inter landoj; Igi urbojn kaj homajn loĝejarojn inkluzivaj, sekuraj, eltenemaj kaj daŭripovaj; garantii daŭripovajn formojn de konsumado kaj produktado; urĝe agi por kontraŭbatali klimatsanĝiĝon kaj ties efikojn; konservi kaj daŭripove utiligi la oceanojn, marojn kaj marajn resursojn cele al daŭripova evoluigo; protekti, restarigi kaj disvastigi daŭripovan uzadon de teraj ekosistemoj, daŭripove mastrumi arbarojn, kontraŭbatali dezertiĝon, haltigi kaj inversii la degeneradon de grundoj kaj haltigi la perdiĝon de biodiverseco; antaŭenigi la konstruadon de pacaj kaj inkluzivaj socioj por daŭripova evoluigo, garantii la eliron al justico por ĉiuj homoj, kaj starigi efikajn, respondecajn kaj inkluzivajn instituciojn je ĉiuj niveloj; plifortigi la realigan kapablon kaj revigligi la tutmondan partnerecon por daŭripova evoluigo”*.

Tiuj ĉi 17 Celoj ne nur devas esti plenumataj de la Fakaj Institucioj de Unuiĝintaj Nacioj, sed de ni ĉiuj, civitanoj de la mondo.


Fine, por festi tiun Tagon, kutime oni organizas koncertojn kaj aliajn eventojn ĉe Unuiĝintaj Nacioj, eĉ la Ĝenerala Sekretario prelegas.

Maria Rafaela Urueña
(Honora Prezidanto de Esperanto por UN)

OMAĜO AL FÉLIX DÍEZ MATEOS (Esperantisto 1889-1981)

- 10 de septembro de 2022 -

Actos de Homenaje a su Hijo Predilecto D. Félix Díez Mateo (1889-1981)



El Ayuntamiento de Villaviudas celebrará homenaje a nuestro hijo predilecto D. Félix Díez Mateo el 10 de septiembre de 2022.

Para Villaviudas el legado que Félix nos dejó es impagable, aportando a nuestro patrimonio cultural un tesoro sin precedentes.

Invitamos a todos los vecinos a participar en este homenaje, dando a nuestro hijo predilecto más ilustre los honores que se merece, y seguir estando orgullosos como vecinos por compartir las raíces de una persona tan insigne como distinguida.



FÉLIX DÍEZ MATEO

Nació en Villaviudas el 29 de julio de 1889.

Cursó las primeras letras en su pueblo natal, continuando su estudio en Bilbao con los Jesuitas, en Valladolid Filosofía y Letras, y en París, Londres y Munich, Filología.

Casó con la dama alemana Teresa Frieda Hochleitner, su gran complemento en sus investigaciones lingüísticas, cerca de 50 idiomas le eran familiares, y resultó abundantemente el Padre de familia en distintos idiomas y dialectos.

Tuvieron tres hijos: María Teresa, María de la Paz y Ricardo, todos muy ligados a las tierras palencinas.

"Dedicado por la patria por la palabra", como acertadamente le definió Antonio Tovar, se convirtió en viajero incansable y poseedor eminente como docente en las dos Universidades de Salamanca, la de Duero y el Instituto Caro y Guzman de Bogotá.

Por invitación de Don José Ortega y Gasset, la editorial Espasa Calpe publicó numerosas obras traducidas por él, principalmente del ruso y del alemán, escribiendo también otros libros, entre los que destaca el Documento Español Emigrado y varios diccionarios bilingües. La editorial Gredos publicó su *Agrado Escolar* y la *Agrado del Estudiante*.

La institución Tello Teller le nombra Académico de Honor, y el Estado Español le otorga la Enciclopedia de la Orden de Alfonso X El Sabio, como reconocimiento oficial a sus méritos. Creó un instituto para ciegos en República Dominicana, introduciendo en aquel país el uso del Braille, del que era profundo conocedor y amante.

Fue un entusiasta esperantista. Presidió el Grupo de Bilbao y el 27º Congreso Español de Esperanto de 1966, donde se hacía llamar "Félix", su nombre en esperanto que se usó desde entonces para llamarle cariñosamente.

Falleció enseguida en Palencia el 10 de julio de 1981, siendo enterrado en su villa natal. Sobre su tumba en el cementerio de Villaviudas se lee esta inscripción que resume toda su vida:

*Tiene a los ojos,
Vive en la promesa de Dios,
Murió en su paz.*

Así a su pueblo natal, al que quería ver engrandecerse culturalmente, con el agradecimiento constante al lugar que siempre fue punto de referencia de su vida y meta de retorno a la hora de su muerte.

Villaviudas, julio de 2022

Programa
10 de septiembre de 2022

17:30 h. Saludo y recepción de autoridades en la Plaza del Ayuntamiento de Villaviudas.

18:15 h. Descubrimiento de la placa conmemorativa de su nacimiento en la Calle Félix Díez Mateo a cargo del Sr. Alcalde,
Don Juan Carlos Cantera Fernández.

18:45 h. Inauguración de monumento en la Escuela de Educación Infantil Glicerio Martín, a cargo de **Doña Inmaculada Martínez Merino**, Directora General de Políticas Culturales de la Junta de Castilla y León.

19:15 h. Acto institucional en el Centro Socio-Cultural Ignacio Marín Cantera con el siguiente programa:

- Palabras de bienvenida a cargo del Sr. Alcalde.
- Palabras de **Doña María Ángeles Armisén Pedrejón**, Presidenta de la Diputación Provincial de Palencia.
- Palabras de **Don Federico Mayor Zaragoza**, Presidente de Fundación Cultural de Paz (Tbc).
- Palabras de agradecimiento en nombre de la familia a cargo de **Don Ricardo Díez-Hochleitner**, nieto mayor, Embajador de España.

La 10an de septembro, la Magistrato de Villaviudas (pr. Bijabiúdas), vilaĝo de la provinco Palencia, organizis omaĝon al unu el la plej elstaraj esperantistoj de la E-Grupo de Bilbao, Félix Díez Mateos, kiu naskiĝis en tiu loko.

En la oficiala retpaĝo de la Magistrato troviĝas mallonga biografio, en kiu eblas legi:

“Li estis entuziasma esperantisto, Prezidanto de la *Grupo de Bilbao* kaj de la 27a Hispana Kongreso de Esperanto en 1966, kie li devigis la aliajn nomi lin “*Felikso*”, lia nomo en Esperantujo, uzata de lia germana edzino Frieda kiel karesnomo”.

En la omaĝo prelegis Federico Mayor Zaragoza, Ĝenerala Direktoro de UNESKO inter 1987 kaj 1999.

Kaj ankaŭ prelegis Ricardo Díez-Hochleitner, nepo de Félix Díez kaj filo de lia samnoma patro, Ricardo Díez Hochleitner, ekonomiisto kaj diplomato, Prezidanto de la Klubo de Romo

inter 1990 kaj 2000, kaj “patro” de la hispana edukreformo de la jaro 1970.

La urbestro de Villaviudas sendis invitilon ankaŭ al la Prezidanto de HEF, sed ne eblis la partopreno de iu estrarano.

(<https://villaviudas.es/index.php/2022/09/08/homenaje-a-felix-diez-mateo/>)

PRI GRUPOJ KAJ ASOCIOJ

Andaluzio

Malago

KURSO DE ESPERANTO

La “Cafetería Esperanto” estas nia renkontpunkto ĉi-jare por perfektigi niajn konojn kaj instrui novajn lernantojn. Kompreneble, se la grupo tro grandiĝas, kompreneble, ni devos repreni la kutiman klasĉambrom en la publika lernejo. Pormente ĉio enordas kaj kun ĝojo ni kafumas kaj bierumas en Esperanto. En la apudas foto oni povas vidi la grupon, (instruistoj kaj gelemantoj).



Sevilo

KUNSIDO DE LA LKK DE LA HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO EN LA URBO SEVILO.

La 1-a de oktobro, mi havis la okazon partopreni kunvenon kun la LKK, kiu preparas la venontan Hispanan Kongreson okazonta en Sevilo de la 12a ĝis la 15a de oktobro 2023, kaj kun granda ĝojo mi povas informi ke la grupo arde laboras por trovi la plej



taŭgan kongresejon kaj oni prezentis kelkajn eblecojn por elekti, sed la ĉefa ideo estas akiri senpagan ejon kaj pro tio oni decidis komenci per la Urbodomo, kaj se tio ne eblas, ne tro gravas, ĉar estas pluraj tre interesaj ejoj.

Mankas nur kelkaj detaloj por finpretigi la paĝaron de la kongreso kaj tio ekfunkcios la unuaj tagoj de oktobro.

Ankaŭ oni parolis pri la antaŭ kaj post kongreso, sed ni devas atendi por informi pri tio, ĉar

oni parolas pri vizito al la historia urbeto Carmona, interalie.

Ángel Arquillos

ARAGONO

Esperanto-Tago, same kiel naskiĝtaga datreveno, estas preteksto aŭ motivo (elektu laŭprefere) por celebri.

En Zaragozo, okaze de la ĉi-jara Tago de Esperanto, ni decidis proponi diversan celebri. Do, je la tago 26a de la monato 7a, ni renkontiĝis vespere (espere) je 7a horo, 26a minuto, ĉe Esperanto-monumento en centra placo nomata "Glorieta del Esperanto". Ni volis profiti la koincidojn de du cirkonstancoj (tempo kaj spaco) kiuj estis simboloj: simbola tempo (apero de Esperanto en la monda historio) kaj simbola spaco (E-nomata kaj monumentata loko en nia urbo).

Oni parolis pri la motivo de la E-Tago, la Unua Libro (jes ja, la esperanta aventuro komenciĝis per libro, konkretigo de idealisma sento), publikigita en Varsovio la 26an de julio (la 14an, laŭ tiama julia kalendaro tie uzata) en jaro 1887, en rusa lingvo sub la kaŝnomo D-ro Esperanto.

Foje oni aŭskultas, ke Tago de Esperanto estas la 15a de decembro. Sed tiu dato estas Tago de (naskiĝdatreveno de) Zamenhof aŭ Tago de Libro en Esperanto-mondo laŭ iama propono de Julio Baghy (revuo Esperanto, dec. 1927).



Pri tiu Unua Libro, vere libreto (titolita "Internacia Lingvo. Antaŭparolo kaj plena lernolibro"), ni memorigis, ke estas diversaj partoj:

A) Antaŭparolo:

- Antaŭparolo
- 6 specimenoj de tekstoj, tradukitaj (la unua, preĝo "Patro nia") kaj originalaj, prozaj kaj versaj.
- 8 slipoj kun promeso de lernado de lingvo (pri dek millionoj)

B) Plena lernolibro:

- Alfabeto
- 16 reguloj
- Vortar(et)o Esperanta-rusa (en faldfolio)

Indas substreki, ke en la antaŭparolo, Zamenhof mencias tri punktojn aŭ problemojn pri internacia lingvo. Kaj la unua estas jena: "Ke la lingvo estu eksterordinare facila, tiel ke oni povu ellerni ĝin ludante".

Krome, menciindas ke en tiu tago, matene, okazis intervjuo je 11:10 horo en "Aragón Radio" (programo "Despierta Aragón"), reaŭskultebla en interreto, farita al Lorenzo Noguero.

Valencio

Alternativa foiro

Laŭkutime, nia Esperanto Grupo de Valencia partoprenas ĉiu-jare per amasa ĉeestantaro (ĉirkaŭ 10 E-istoj ĉiu-foje) kaj stando aŭ malgranda budo en la Alternativa Foiro de Valencia. Sed, kompreneble, pro tiu murdema pandemio, tiu evento ne okazis dum la lastaj du jaroj. Ĉi-jare, finfine, oni okazigis la eventon denove, kaj nia grupeto partoprenis volonte kaj plezure.



La vetero ankaŭ multe helpis, ĉar dum tiu junia semajn-fino la suno brilis tra preskaŭ sennuba ĉielo. La evento daŭris tri tagojn, kiel kutime, kaj la unuan tagon -vendrede post-tagmeze- kelkaj el ni -Carmen, Rosa, Eduardo, Elías- dediĉis kelkajn horojn munti la standon kie ni montris E-ajn verkojn -Kihoto, poemaro de Miguel Hernández, poemaro de García Lorca, ...- kaj dekon da revuoj.



Ne surprizige, la ĉeestantaro al tiu evento pliiĝis de tago al tago, dum la semajnfino, kaj oni sukcesis vendi kelkajn librojn kaj revuojn, sed, tio kio plej gravas, oni informis pri niaj aktivaĵoj -fulmo kursetoj, prelegetoj, renkontiĝoj, ret-kunvenoj, ...- al amaso de gevizitantoj, inter kiuj multaj el ili neniam aŭdis paroli pri nia mirinda lingvo. Estis vera plezuro paroli pri E-o, sed ĉefe interbabili inter ni dum kelkaj horoj sen preskaŭ krokodilado...

Nia prezidanto Raúl organizis dum la komenco de la monato nian partoprenon. Dennis estis intervjuita de loka radio.

Nun, ni esperas kaj atendas nian venont-jaran partoprenon, sed ĉi-foje kun pli da eroj montrotaj, ĉar multaj vizitantoj starigis demandojn malfacile respondeblaj (pri venontaj

kongresetoj, ...), petis partopreni je ne okazontaj kursetoj kaj mendis aliajn erojn (steletojn, ĉapeletojn, flagetojn, ..., pri E-o) ne disponeblajn tiu-momente ... Certe, venont-jare ni pretigos pli bone nian partoprenon ...

Madrido

Madeleine vizitis nin

Pasintan 9an de julio, sabate, vizitis la HEF-ejon Madeleine Canavase, knabino el Kalifornio, kiu kune kun sia patrino vojaĝis al Hispanio. Madeleine, novbakita esperantisto, memlernis la lingvon dum la pandemia trudizoliĝo, profitante la liberan tempon, kiun lasis al ŝi la lernejoj. Evidente, temas pri tre talenta knabino, kiu baldaŭ akiris grandan kompetenton pri la lingvo.



Ŝi posedas ampleksan vortostokon kaj atente elektas la taŭgan terminon por ĉiu kazo. Ŝia parolo fluas kaj ŝi zorgas pri ĝusta prononcado. Neniu dirintus, ke unuafoje en Hispanio, ŝi parolis Esperanton kun eksterlandanoj.

Madeleine, krome, provas disvastigi la lingvon inter familianoj kaj geamikoj. Kaj ni ne dubas, ke ŝi sukcesos.

Kelkaj madridanoj, sciinte pri ŝia vizito al la sidejo, aliĝis al la rendevuo. Ni pasigis tie tre agrablajn momentojn, kaj ankaŭ poste, en apuda restoracio, kie ni ĉiuj kuntagmanĝis. Ni eĉ havis la okazon kanti "Bondezirojn al vi", ĉar du tagojn poste ŝi iĝos deksejaraĝa! Ne mankis fotoj, vi povas tion imagi. Nek malgrandaj donacetoj. Por fini, Madeleine petis de la ĉeestantoj registri salutvortojn sendotajn al ŝia plej juna fratino, Rachel, dektrijaraĝa, kiun ŝi jam enkondukis en la vojon de esperantistiĝo. Kompreneble, plej volonte ni ĉiuj tion faris.

Bela renkontiĝo, do, malgraŭ la rigoroj de la somera vetero.

Vélez-Málaga

La publika mezlernejo IES Almenara de Vélez-Málaga estis la unua hispana mezlernejo kie oni povis lerni oficiale Esperanton dum la lernokurso 2019-20 kiam dank'al projekto Esperanto Komunikado kadre de la Eŭropa programo Erasmus+ oni introdukis la lernofakon "Esperanto kaj Eŭropaj valoroj" kiel elekta lernofako en la unua kurso de Bakalaŭro. Esperanto estis do oficiale tiel valora kaj grava kiel la Angla, Matematiko, Hispana, Sciencoj, aŭ Historio. Pli ol 20 studentoj elektis Esperanton kiel lernofako, kaj la kurso okazis bone ĝis la malgaja alveno de la kronviruso kaj la posta pandemia enfermiĝo.



Post la fino de tiu Eras-
musa projekto, dukursa
paŭzo, kaj malfacila labo-
ro de informado kaj pro-
pagando pri la lernofako
finfine dum en la nuna
lernojaro 2022-23 pli ol
36 studentoj petis Espe-
ranton kiel elektebla ler-
nofako kaj 30 el ili atin-
gis tiun eblon. Ili multe
interesiĝas pri la rapida
kaj facila lernado de la
lingvo kiu permesas al ili
rapide ekparoli kaj kom-
preni ĝin, kaj tiel atingi
bonajn akademiajn rezul-
tojn. Ankaŭ la ebla vizito
al Andaluza urbo estis grava por ili. Ni esperas organizi interŝanĝon de lernantoj kun
franca kaj slovena mezlernejoj per interreto, kaj kalkulas kun la helpo de AEU en ĉiuj
niaj laboroj.



Nia revo estas atingi ke aliaj mezlernejoj ankaŭ ofertu la fakon de Esperanto, aliaj ins-
truistoj kiuj parolas Esperanton povus facile proponi ĝin en siaj lernocentroj, ĉar ni
malfermis la vojon kaj ni ne volas esti la sola Esperanta mezlernejo el Hispanio, sed
nur la unua paŝo por fosi novan sulkon.

A. Fabián Jiménez

Instruisto de Geografio, Historio kaj Esperanto.

Teruelo

Alberto Granados gvidos kurson de Esperanto
“Enkonduko kaj Plibonigo” ĉiun lundon ĉe la
klasĉambro 4 de la Lernejo por plenkreskuloj
(Placo de Santa Teresa, 8),
Ekde la 17a de oktobro 2022, de 8:00 p.m. ĝis
9:30 p.m.

Asociación Esperantista Turolense LIBERANI-
MO

Se vi interesiĝas, sendu mesaĝon al suba retadre-
so:

esperantoteruel@gmail.com

Bilbao

Parta renovigo de la estraro de la Grupo de Bilbao.

Kiel anoncite, la 10an de junio oni okazigis la laŭleĝe devigan ĝeneralan kunvenon de nia asocio. Bedaŭrinde ĝin partoprenis nur 7 membroj.

Inter aliaj aferoj oni nomumis novan estraron, kiu restas jene:

Prezidanto: Francisco López López.

Vicprezidanto: David Redondo Rodríguez.

Secretario: Jesús Miguel García Iturrioz.

Kasistino: Iciar Arteche Urrutia

Voĉdonantoj: Octavio Gutiérrez Moja.

Edorta Moreno Martín.

Diego Guerín Aguilar.

Novaj kursoj en nia Grupejo.

Kun la alveno de aŭtuno, ankaŭ alvenas novaj kursoj:

Meznivela: komenciĝos la 21an de oktobro kaj daŭros ĝis decembro. Por tiuj, kiuj iam studis la lingvon. Gvidanto: David Redondo.

Babilrondoj. De la 13a de januaro ĝis la fino de februaro.

Baza kurso: de marto ĝis junio. Gvidantoj: David Redondo, Edorta Moreno kaj Hodei Redondo.

Toloso

ESPERANTISTA ĤORO EN LA 20a INTERNACIA PACO-TAGO EN GIPUSKO

Okaze de la 20a Internacia Tago pri Paco, Ne-Registaraj Organizo partneraj kun Unesko organizis grandan eventon, la 17an de septembro 2022, en Toloso (Gipusko, Eŭskio, norda Hispanio), en kiu partoprenis esperantista ĥoro, la Internacia Esperanto-Koruso, fondita en 1980, sub la gvido de Zdravka Bojĉeva. Nia koruso enhavis dudekon da kantantoj el dekduo da landoj (Hispanio, Francio, Svislando, Luksemburgo, Danlando, Estonio, Pollando, Rumanio, Bulgario, Usono, Kanado kaj Kostariko). Ankaŭ partoprenis en la evento ĥoroj el Kolombio, Madrido, Eŭskio, kun junulara ĥoro.

Membro de la ĥoro, Linda Le Nepveu, franc-bulgara esperantisto, filino de Zdravka Boytcheva, partoprenis ankaŭ en la ronda tablo pri rilatoj inter arto kaj paco. Prezentine Esperanton kiel universalan lingvon, ŝi aldonis, ke muziko estas eĉ pli universala ol Esperanto, kaj akcentis ke por daŭripova paco plej gravas edukado kaj konsciigo, ke ĉiu el ni havas ion por diri.

La tutan koncerton eblas spekti rete: <https://www.youtube.com/watch?=7TXxnbrMTj8>, kaj eblas legi pliajn informojn en la retejo: <https://www.bakea.eus>.

**ESPERANTO
KURSO**

La lengua internacional neutral
NIVEL MEDIO – MEZNIVELA KURSO –
(Curso gratuito para aquellos que ya tenéis conocimientos previos del idioma)



Comienzo: VIERNES 21 DE OCTUBRE / Fin: 23 de DICIEMBRE 2022
Todos los viernes de 19:30h a 20:30h

GRUPO ESPERANTISTA DE BILBAO

Barrenkale Barrena 7 – 1ª Dcha (Fundado en 1906)
Esperantobi@gmail.com Tfno: 656 77 60 65
<https://sites.google.com/site/esperantobi/home>

LA TRAJNO DE LA 40-a JAROJ, LA PLEJ EFE- MERA FERVOJA LINIO EN HISPANIO

En la jaro 1937, la trupoj de la generalo Franko, kiu ribelis kontraŭ la registaro de la Hispana Respubliko, ĉirkaŭis Madridon. Antaŭe, en novembro 1936, la registaro decidis transloki la sidejon de la respublika administracio de Madrido en Valencio. La rekta surtera komunik-linio inter ambaŭ urboj estis malgranda koridoro kiu ankoraŭ restis sub la kontrolo de la respublika armeo. En 1937 la prezidanto de la respublika registaro, Juan Negrín, proponis konstrui fervojan liniojn tra tiu koridoro por ebligi la rektan komunikon inter Madrido kaj Valencio. La ideo estis konstrui tiun fervojon dum apenaŭ 40 tagoj, kvankam poste estis necesaj 100 tagoj por vidi la finon de la laboroj. La respondeculoj estis la inĝenieroj Andrés Arrilaga kaj Emilio Kowalski.

Ebligis la konstruon de la fervoja linio 10.000 laboristoj, la plejmulto el ili estis prizonuloj de la frankisma armeo. Pro tio, kvankam la linio ne estis malproksima de tiu armeo, la laboro ricevis neniun bombardadon, ĉar la frankismaj aviadiloj ne deziris murdi siajn proprajn kunulojn.



Laboroj dum la konstruo de la fervoja linio

Por eviti eblajn atakojn post la fino de la konstruo, la fervoja linio trakuris flankigita de talusoj kaj ene de tuneloj. La nova linio komenciĝis en la madrida urbo Torrejón kaj finiĝis en Tarancón (Kvenko), entute pli ol 90 kilometroj. Fine, estis necesaj 100 tagoj por vidi la unuan trajnon sur la reloj, tio okazis en junio 1938. Tamen, la ĵus konstruita fervoja linio havis gravajn neperfektaĵojn, sendube la urĝeco dum la konstruo kaj la fakto, ke la malamikaj prizonuloj mem starigis la linion, provokis ke reloj kaj platformoj ne estis bone konstruitaj.



Nuntempa stato de la fervoja linio. Oni povas vidi, ke ĝi trakuris inter altaj talusoj por eviti atakojn de la malamika armeo.

La trajnoj uzitaj por tiu fervoja linio estis tiuj kiuj restis en Madrido en la komenco de la milito, en julio 1936. La linio funkciis ĝis la monato aprilo 1939, tio estas, ĝis la fino de la civila milito. La fervoja linio utilis dum tiuj monatoj por faciligi la transporton de soldatoj kaj armiloj de Madrido en Valencion.

Okaze de la fino de la milito oni jam ne uzis plu la fervojan linion. En la jaro 1940 la novaj aŭtoritatuloj decidis malmunti definitive la tutan konstruon. Nuntempe kelkaj kilometroj de tiu “fervoja linio de la 40 tagoj” utilas kiel verda vojo por biciklanktoj kaj promenantoj.



Hispana Amikaro de Fervojistoj Esperantsitaj
fervojista@esperanto.ac
<https://hafe-19.websself.net>

LA HEREDAĴO DE LA UNIVERSALA FRATECO

La 21-an de junio de 2022 okazis en la Fakultato pri Geografio kaj Historio de Universitato de Barcelono la ronda tablo *La heredaĵo de universala frateco. Ŝanĝo kaj daŭrigo en la Esperanto-movado*. Ĝi apartenis al la dua Internacia Kongreso organizita de la sekcio pri Nuntempa Historio de tiu ĉi fakultato kaj temis ĝenerale pri Heredaĵoj. En 2025 okazos la tria de tiaj kongresoj. Entute partoprenis c. 200 homoj en 23 malsamaj tabloj. Kun 11 prelegantoj, tiu esperantista estis unu el la plej multnombraj.

La ronda tablo strukturiĝis en du partoj. Unue la veterana loka historiisto Serafin Aldecoa parolis pri la alpreno de Esperanto fare de la kulturaj elitoj de Teruelo. Aldecoa aŭtoras la libron *Esperanto kaj esperantistoj de Teruelo*, publikigita en 2021. Due prelegis Héctor Vicente, kiu antaŭ kelkaj monatoj doktoriĝis en Universitato de Saragoso pri la respublika urbestro en tiu urbo. Lia kontribuo pritraktis la biografion de unu el la magistratanoj, la esperantisto Manuel Maynar. Siaflanke, Roberto Garvía emfazis la diversecon de la Esperanto-movado en Hispanio ĝis la intercivitana milito. Garvía estas katedrulo pri sociologio en la Universitato Carlos III de Madrido kaj aŭtoro de pluraj elstaraj verkoj pri la Esperanto-movado. Poste prezentis sian esploron la doktoriĝantino en Universitato Saint Andrews (Scotlando) Pilar Requejo: “Esperanto kaj naciismo en la Iberia duoninsulo: Hispanio, Katalunio, Portugalio.” Sekve, Eric Macpherson proponis teorion kadron por kompreni la akcepton de la aŭstraj infanoj post la granda milito. Fine, tiu kiu subskribas ĉi tekston (kaj kiu kunordigis la tablon) prelegis pri la esperantistoj en la Internaciaj Brigadoj.



Post paŭzo, la dua parto de la tablo pritraktis la rilaton inter Esperanto kaj aro da ideoj kaj/aŭ sociaj kaj/aŭ politikaj movadoj, pri kiuj interesiĝas grupo da esploristoj en Universitato de Parma (vidu la nomon de ĉiu esploristo interkrampe): la rotarioj, pere de la asocio *Rotaria Amikaro De Esperanto* (Davide Astori); la framasonoj, rilate al Mario Dazzini (Nicola Reggiani); la bahá'í, pere de la ekzemplo de Alessandro Bausani (Anna Mazza - kvankam tiu prelego estis enprogramigita, fine ĝi ne okazis); la socialismo kaj la figuro de Angelo Filippetti (Giovanni di Stefano); kaj la faŝismo, konkrete pri Radio Roma (Matteo Cloriti). La ligo kun la nuntempo, koncerne la brazilan

esperantistan junularon, pritraktis la doktoriĝantino en Universitato Saint Andrews kaj aktiva membro de TEJO Manuela Burghilea.

Unu el la punktoj, kiuj kaŭzis pli da diskutoj, kaj en la unua parto, kaj en la dua parto de la sesio, estis ĝis kioma grado eblas konsideri la esperantismon ion dekstr(em)a aŭ maldekstr(em)a. La debato estis pasive poliglota, t.e. ĉiu parolis en sia lingvo: katalune, hispane, esperante, iom angle... kaj tre ofte itale. Menciindas la ĉeesto de pluraj lokaj samideanoj kaj ankaŭ de la esperantisto kaj gastprofesoro pri Politikaj Sciencoj en Universitato Pompeu Fabra Michele Gazzola, tre aktivaj en la debato.

Javier Alcalde



POEZIA ANGULO

Jorge Camacho

Romanco pri la enamiĝinto kaj la morto

La ĉi-sekva traduko de la hispanalingva vokalrima kaj anonima poemo *Romance del enamorado y la muerte* unue publikiĝis ene de mia artikolo *Pokaj belo kaj arto [Nerecenzo pri Belarta rikolto 2020]*, publikigita en *Beletra almanako* 42 (Oktobro 2021, p. 143-154). Ĉi-okaze mi aldonas la originalon por komparo.

Un sueño soñaba anoche
soñito del alma mía,
soñaba con mis amores,
que en mis brazos los tenía.
Vi entrar señora tan blanca,
muy más que la nieve fría.
– ¿Por dónde has entrado, amor?
¿Cómo has entrado, mi vida?
Las puertas están cerradas
ventanas y celosías.
– No soy el amor, amante:
la Muerte que Dios te envía.
– ¡Ay, Muerte tan rigurosa,
déjame vivir un día.
– Un día no puede ser,
una hora tienes de vida.
Muy deprisa se calzaba,
más deprisa se vestía;
ya se va para la calle,
en donde su amor vivía.
– ¡Ábreme la puerta, blanca,
ábreme la puerta, niña.
– ¿Cómo te podré yo abrir
si la ocasión no es venida?
Mi padre no fue al palacio,
mi madre no está dormida.
– Si no me abres esta noche,
ya no me abrirás, querida;
la Muerte me está buscando

Ĉi-nokte mi songis songon,
plej dolĉan songon animan,
mi songis pri la amata,
ŝi en miaj brakoj sidas.
Jen venas blankega damo,
pli blanka ol neĝo frida.
– Kiel vi envenis, kara?
Tra kiu pord', vivo mia?
Ĉiuj pordoj kaj fenestroj
kaj ĵaluzioj fermitas.
– Amant': mi estas ne amo
sed Morto de Di' sendita.
– Aj, rigora Morto, lasu
ke mi vivu tagon plian!
– Unu plena tag' maleblas,
unu vivhoru sufiĉas.
Ege haste li sin vestas,
des pli haste enŝuiĝas;
li rapidas al la strato
kie lia am' rezidas.
– Apertu¹ la pordon, blanka,
apertu ĝin, juna mia!
– Kiel do mi vin enlasu
dum okaz' ne prezentiĝas?
Patro ne iris palacen,
patrino restas vekita.
– Se ne ĉi-nokte, amata,
vi enlasos min neniam;
la Morto mem min serĉadas,

junto a ti vida sería.
– Vete bajo la ventana
donde labraba y cosía,
te echaré cordón de seda
para que subas arriba,
y si el cordón no alcanzare,
mis trenzas añadiría.
La fina seda se rompe;
la muerte que allí venía:
– Vamos, el enamorado,

ĉe vi la vivo min ŝirmas.
– Iru nun sub la fenestron
kie kudri mi kutimas,
kaj por ke vi grimpu supren
mi havigos ŝnuron silkan
kaj eĉ miajn proprajn tresojn
se la ŝnuro ne sufiĉas.
Rompiĝas la fajna silko;
la Morto tien rapidas:
–Venu jam, enamiĝinto,

¹**aperti**: (tr.) malfermi (*Plena vortaro*, 1934, kaj ĉe pluraj aŭtoroj ĝis la apero de “ovri” en la 1970aj jaroj; malgraŭ la rimarkoj en *PIV 2002* kaj *ReVo*, nenio malhelpas transitivecon de “aperti” apud stata signifo de “aperta” simile al “dubi/duba”, “falsi/falsa”, “fiksi/fiksa”, “fuŝi/fuŝa”, “kaŝi/kaŝa”, “konfuzi/konfuza”, “kompliki/komplika”, “korekti/korekta”, “susekti/suspekta”, “veki/veka” k.a.): “Jam la drak’ apertis sian monstran buŝon” (*Johano la Brava*, XXV, trad. K. Kalocsay); “Ĉu volas vi, ke via Bild’ apertas / palpebrojn miajn pezajn lacanokte” (*The sonnets / La sonetoj*, de W. Shakespeare, “soneto 61”, trad. W. Auld); “kaj, dume, ĝue / apertu la okulojn” (Jorge Camacho, *Strangaj spikoj*, 2016, p. 17).

Tiun ĉi belegan poemon “Romanco pri la enamiĝinto kaj la morto” vi eble legis en la lasta Boletín438, sed pro teknika eraro kaj malzorgo, (mi) la redaktoro, malaperigis kelkajn versojn, kiujn mi aldonas kaj petegas pardonon al la legantoj, kiuj relegos kaj ĝuos la tutan poemon.



La Stranga angulo

Ĉapitro 6a

Nur unu konsilo por la celo sukcesigi la anglan kiel esperantisto

Vi same kiel mi scias, ke malgraŭ la ofta laŭta plendo de multaj esperantistoj pri la hegemonio de la angla lingvo, fone ili mem tenas malan sintenon, pene klopodante apogi tian malekvilibron.

Mi ne kontraŭas pri la ekzisto de argumentaro, kiu ŝajnas montri la rifuzon de la lingva hegemonio. Ekzemple, oni povas legi, ke la angla ne estas internacia lingvo, sed nacia lingvo internacie uzata. Trafe. Antaŭ la aserto, ke ĉiuj parolas ĝin, oni povas pruvi la malon surstrate, starigante babiladon kun piedirantoj hazarde elektitaj. Bone. Rilate al la neŭtraleco de ĝia regado, sufiĉas montri ian kalkulon pri la kultura kaj scienca produktado, kiu alportas onin ĝis la konkludo, ke angloparolantaj landoj estas loĝataj de superaj cerboj, aŭ ke al ili nur sufiĉas paroli tiun lingvon kiel gepatran. Prave. Pri la aserto, ke la angla malfermas la pordon de la posteno tiel kaj tiom, ke ĝi estas garantio kaj sen ĝi la celo labori ne eblas, sufiĉas montri ke multaj homoj sen laboro scipovas la anglan, kaj ke multaj laboristoj ne kapablas angle produkti eĉ unu frazon. Science. Mi haltos ĉi tie. La celo de ĉi tiu ĉapitro ne estas reskribi nek aldoneti erojn el la vasta listo de nekoheraĵoj en la diskurso, kiu prezentas la anglan kiel solvon eĉ por eviti la noktan ronkadon.

Tamen, la publika uzado de tiu argumentaro en Esperantujo reprezentas nur la surfacan diskurson, ne la fonan sintenon. Permesu min terure kondukti en la ago krei novan kunmetaĵon kaj proponi la vortacon "anglekompreneble". Eĉ mi pli malbone povas agi streĉante la esprimon ĝis atingi la neatendindan rezulton "anglekompreneblemeco". Ne, ne temas pri longa franca radiko "anglekompreneblemec-" al kiu oni aldonas la o-finaĵon, kiel kutime en nia lingvo. Ĝi estas vera kunmetaĵo. Pri kio temas? Jen la respondo.

Iu studento parolas pri la klubo, kiun li kaj aliaj esperantistoj realigas en sia universitato. Ili klopodis montri la taŭgecon de Esperanto al vizitantoj. Tiuj vizitantoj estis fremduloj. Pro tiu kialo la studento aldonas "Do, ni prezentis Esperanton angle, kompreneble".

Iu aktivulo deziras apogi Esperanton kaj lukti kontraŭ la lingva maljusteco. Pro tio planas kaj realigas seminarion, kie pluraj indiĝenaj lingvoj estos reprezentitaj. La aktivulo klarigas "Ĉar venis scivolemantoj de aliaj landoj, ni enkondukis la temon angle, kompreneble".

Esperantisto pene sukcesigas la organizon de prelegaro, kies celo estas diskuti inter fakuloj pri la monda problemo de la lingva maljusteco. Tiu aganto asertas "Temas pri scienca renkontiĝo, do ni realigis la enhavon angle, kompreneble".

Fakulino pri lingvistiko deziras science aŭ universitate denonci la lingvan malekvilibron en la mondo kaj la malbonajn konsekvencojn, kiuj devenas de la netaŭgeco de la angla kiel internacia lingvo. Meze de ŝia diskurso klare aŭdeblas "Ni bezonas disvastigi tiujn karakterojn de la maljusteco, kaj ke ili venu en ĉiujn lokojn. Do ni nepre publikigu tion angle, kompreneble".

Monda Esperanta organizado pri la temo T (la temo ne gravas nun) diskutas pri la elekto de nova reprezentanto, eble la prezidanto. Sur la tablo moviĝas kelkaj nomoj. Ŝajnas, ke ĉiuj eblas. Tamen, uno el la estraranoj demetas unu el la nomoj per "Li estas vere ŝaga kaj energia, havas bonajn ideojn kaj kapablojn. Tamen li ne taŭgas, ĉar nia reprezentanto devas regi la anglan, kompreneble".

Ekde ke mi ekkonsciis pri la anglekompreneblemece en Esperantujo, ĝia frekvenco ŝajnas altiĝi. Tio ne povas esti reala. Verŝajne mia cerbo des pli kapablas rimarki la ekziston de tiu sinteno ju pli ekzercas tian kapablon.

La anglekompreneblemece komforte piediras sur la surfaco de Esperantujo, tuŝante eventojn, ideojn, planojn, elektojn kaj ĉiajn agadojn. Mi ne asertos, ke ĝi regas. Sed se vi ankoraŭ publike defendas, ke la esperantistoj estas luktantoj kontraŭ la lingva hegemonio, kies lingvo nuntempe estas ĉefe la angla, pripensu. Observu malrapide kaj atenteme vian ĉirkaŭaĵon. Plejeble vi trovos, ke ofte ni fortigas la anglan per ĝia uzado kaj praktika defendado.

Mi parolas la hispanan, gepatra lingvo de 500 milionoj da homoj, danke al ĝia subpreman-ta kvalito de koloniaĵo, ĉefe en Latinameriko. Mi parolas Esperanton, per kiu mi havas pli da geamikoj, kontaktoj, projektoj, laboroj ktp ol mia kapablo. Sed se mi taksus, ke ĉi tiu enhavo meritas esti diskonata, mi forlasus kaj la hispanan kaj Esperanton, reskribante la enhavon angle, kompreneble.

Viko

La 89-a Itala Kongreso de Esperanto en Breŝo 20-27.8.2022

Ĉi-foje ĝi okazis en la itala urbo Breŝo (Brescia) situanta en la norda parto de Italio, regiono de Lombardio, inter Milano kaj Verono. Apud la kastelo kiu dominas la urbon staras vapor-lokomotivo. La kongresejo troviĝis en la hotelo *Ambasciatori*. En la enirhalo instaligis akceptejo kaj libroservo.

Al la evento aliĝis pli ol 200 geesperantistoj, sed ne ĉiuj povis veni. Teresa Pomorska el Pollando venigis grupon de 27 adeptoj por Esperanto, kiuj entuziasme frekventis la Esperanto-kursojn, kiuj okazis en la apuda hotelo *Master*. La kurson por komencantoj gvidis pakistatano loĝanta en Italio Mian Salam Shany kaj la progresantojn instruis Marc Giraud el Francio. Eblis ankaŭ lerni la italan lingvon kaj okazis ekzamenoj de IIE (Itala Instituto de Esperanto).

Kiel jam sciata, la italaj Esperanto-kongresoj estas renomaj pro altnivelaj, plej variaj kaj interesaj programeroj. La temo de la ĉi-jara kongreso estis "Paco ne okazas hazarde: la aktiva rolo de ĝemelurbaj rilatoj en la konstruo de eŭropa popolo". Temis pri ĝemelaj urboj, pri kiuj dum la solena inaŭguro okazanta en la urba Aŭditorio *San Barnaba*, François Lo Jacomo emfazis la gravan kaj utilan rolon de ĝemeliĝo por interkompreno en kiu ankaŭ Esperanto povas favore kontribui. Samtempe en la loko eblis aĉeti poŝtkartojn kun speciala stampo. Posttagmezo estis rezervita por gvidata promeno tra la urbo por eksterlandanoj, dum italoj havis sian jar-sembleon.

La programo kontentigis ĉies postulojn. La matenojn plenigis seminarioj pri: "Nunaj konfliktoj en la Mediteraneo" fare de Javier Alcalde. Pri Sociaj retejoj: "Kiel starigi kaj prizorgi ilin?" AMO-seminario, zorgita de Debora Rossetti.



Dum la prelegoj ni povis ekscii pri "La historio de la okcitanaj lingvo kaj kulturo" de ties spertulo Jean-Marc Leclercq (JoMo), pri "Hibridaj trajnoj por plibonigi la medion" donis informojn Vito Tornillo. Pri "Kulturhistorio kaj pri ĝemelaj urboj" prelegis Detlef Haussner. Pri "30 oraj horoj kaj instruado en la lernejoj" informis Brunetto Casini. Pri "Ateistoj" parolis Anna Löwenstein. Pri "La biokemio de la enamiĝo" informis Luigi Fraccaroli. Pri "La itala lingvo en Svislando" kompetente parolis Mireille Grosjean. Kunvenis ankaŭ itala sekcio de ILEI.



Ĉiutage okazis libro-prezentadoj. Ni ankaŭ spektis projekciadon de la filmo "Pino-hazarda vivo de anarkiisto", dediĉita al la esperantisto Pinelli. Pri "Esperanto kaj Anarkiismo" parolis Javier Alcalde.

La organizantoj prezentis kaj donis informojn pri la venonta UK en Torino okazonta fine de julio kaj komence de aŭgusto 2023.

Pri nia aranĝo interesiĝis ankaŭ ĵurnalistoj. Venis televid-teamo, okazis intervjuoj kaj poste aperis artikoloj en loka ĵurnalo. En la publika dulingva debato "Kia rolo por la ĝemelaj urboj, pri la strebado al la paco en la Eŭropa kontinento", partoprenis reprezentantoj de la urbo.

Riĉ-enhavaj estis ĉiuj vesperaj programeroj, kiujn ni ĝuis en subĉiela korto de la palaco *Broletto*, kie okazis Festivalo de Esperantista Kulturo. Ili estis alireblaj al ĉiuj civitanoj pri kio zorgis la urbaj instancoj. En busoj estis pendigitaj informoj pri la UK en Torino.

La vesperoj estis dediĉitaj al kulturaj programeroj. Plurlinvajn kantojn liveris kaj entuziasme kantis JoMo, koncertis Kim kaj Radio-mondo, Chiara Raggi kaj Mario Migliucci prezentis rakonto-koncerton, Piero Nissim kaj Franco Meoli kantis "la ĉiamverdaj kantoj" kaj ne mankis itallingva teatraĵo "Doktoro Esperanto".

En la programo ne mankis pluraj tuttagaj kaj kelkaj duontagaj ekskursoj, kiujn bonege prizorgis Emanuele Regano. Tuttagaj ekskursoj direktiĝis al la urboj Milano, Bergamo kaj Verona. Nature oni povis ĝui ĉe la lagoj de *Garda* kaj *Isola* kaj dum la duontaga ekskurso oni povis gustumi vinojn en *Franciacorta*, fama loko pro vinproduktado.

Post la resumo de la laboroj polaj esperantistoj ĝoje kantis dankante al la organizantoj kaj poste la kongreso fermiĝis. Vespere ni povis denove kanti kun Debora Rossetti kaj Luigi Fraccaroli. La kongreso bone sukcesis malgraŭ la sufoka tropika vetero.

Venontjare la Itala Kongreso ne okazos pro la UK en Torino. Do, vi ĉiuj estas jam ekde nun invititaj partopreni la Universalan Kongreson en tiu impona urbo.

Liba Gabalda

IKIKO 2022 OKAZAS PLURLOKE!

Oni povas interpreti la nuntempon plurmaniere. Unu el la plej utilaj vidpunktoj estas rigardi la mondon kiel ujon, kie multege da homoj klopodas komuniki kutime mise, inter aliaj kialoj pro malsimilaj kulturaj referencoj. Estas multaj aŭtoroj, kies vivo konsistas en la studo de la kulturoj. Sed jam estas denoncita, ke pluraj el ili nur komprenas sian, eĉ ne konas aliajn lokojn nek lingvojn.

Malgranda grupo de esperantistoj el diversaj landoj neĉeeste koincidis en kelkaj Esperantaj renkontiĝoj kaj paŝon post paŝo formigis klaran ideon pri la estonteco: ni aranĝos kongreson, kie homoj el malproksimaj landoj, kie oni parolas malsimilajn lingvojn kaj havas malsamajn kulturojn, renkontiĝos kaj atingos bonan komunikadon danke al Esperanto kaj al iu simila kreaĵo, kiu ne ekzistas, sed povas esti pensota kiel Kulturanto.

Ni pli kaj pli serioze pripensis la aferon kaj aranĝis ambician strategion. Ni serĉis rimedojn, apogojn en Esperantujo, disvastigis la ideon... Kaj du jarojn poste preskaŭ nenio el nia revo realiĝis. Preskaŭ nenio krom belega eksperimento inter kelkaj landoj, aranĝita de esperantistoj. Estis IKIKO 2020, la Internacia Kongreso pri Interkultura Komunikado. Venis poste IKIKO 2021 kaj nun, IKIKO 2022.

La tempo montras, ke IKIKO malesperantiĝas. La celo estas tute mala. Tamen, la homoj kiuj prenas la taskon pasie, rimarkeble pli facile venas el ekstero de Esperantujo. Nun IKIKO 2022 okazos en Kolombio, Hispanio, Francio kaj Germanio. Ĉilio kaj Meksiko havis kelkajn problemojn, kiuj batis ilin. Ni parolas pri sidejoj, kie la socio estas en ŝtormo kaj malstabilas. Irano situigis nur en malfacila limo kaj ne certas partopreni.

Sed jen ankaŭ bonaj novaĵoj. Neesperantistoj, kiuj konis Esperanton danke al IKIKO, prenas nun neatenditan celon: videbligi Esperanton. Temas ĉefe pri universitatoj, kiuj havis sian unuan kontakton kun IKIKO en 2020 aŭ 2021 kaj enamiĝis. Estas ili, kiuj nun klopodas fortigi nian lingvon.

Ĉi tiu historio estas nur por la legantoj de nia kara Boletin. Ne estas ie, krom ĉi tie. Se vi deziras pli da informo, jen sinteza donov kaj retpaĝo.

Sintezo: IKIKO 2022 okazas ĉefe rete inter la 8an kaj 12an de novembro. Kelkaj sidejoj ankaŭ aranĝas ĉeestajn spertojn. Oni aliĝas per iu sidejo kaj rajtas sperti ĉiujn. Pli da informo en <https://ikiko.civiencia.io/> kaj viko@civiencia.io

En Hispanujo okazos en du lokoj: Segovio (hispana nomo de la sidejo "Insurrección Creativa") kaj Seviljo (hispana: "Justicia Lingüística"). En la sevilja duonĉeesta renkontiĝo la neesperantistoj sugestas nin partopreni almenaŭ sabate kaj montri al ceteraj kiom bela, utila kaj emociiga estas Esperanto.

Viko

lom da matematiko (8)

NUMEROLOGIO.

Hodiaŭ ni pritraktos supraĵe tiun pseŭdosciencan, kiu estas ofte konata kiel numerologio aŭ kiel mezepoka gematrio. Ambaŭ vortoj ne estas PIV-aj, do mi esperas ne erari uzante ilin.

Se ni rigardas la vortaron de la Lingva Hispana Akademio, la vorto numerologio havas du signifojn: 1. Praktiko ŝajne kapabla profeti pere de la numeroj. 2. Studo de la kaŝita signifo de la numeroj.

Por vojaĝi al la komencdeveno de tiaj studoj ni devus viziti la praan Grekion kaj renkonti Pitagoron (5a-6a jarcentoj antaŭ nia erao) kaj lian skolon. Ili pensis ke eblas redukti la tuton al numeroj, ekz. la muzikon, la movadon de la planedoj, la homajn karakterojn, ktp. kaj atribuis diversajn proprajojn al numeroj.

Por simpligi la aferon, ni forgesos pri Pitagoro kaj okupiĝos nur pri du numeroj, kies famo daŭris ĝis la nuntempo en la mondo de superstiĉoj kaj kies malbona signifo havas matematikan radikon: la numero 666 kaj la numero 17.



Ni iru al la numero 666, konata kiel la “numero de la besto” aŭ la “numero de la diablo”.

Ni ĉiuj konas nian nunan nombrosistemon, kiu estas nuntempe universala, kaj eble eĉ ni memoras, el elementa lernejo, ke ĝi estas dekuma kaj pozicia. Sed laŭlonge de la homa historio ekzistis aliaj nombrosistemoj, ekz. la romia, ankaŭ vaste konata kaj kiu estas nek dekuma nek pozicia (almenaŭ, ne tute).

Sed estis ja multaj aliaj. Nun ni elpensu unu el ili: tiel ke la alfabeto estas ordigita sistemo, same kiel la numeroj, ni uzu literojn anstataŭ niajn konatajn ciferojn, tiel ke:

A=1, B=2, C=3, D=4, E=5, F=6, G=7, H=8, I=9, J=10

Pro tio ke la literoj rapide elĉerpiĝus, post 10 eblas fari

JA=11, JB=12, JC=13, JD=14, ...
K=20, KA=21, KB=22, KC=23, ...
L=30, M=40, N=50, O=60, P=70, Q=80, R=90,
S=100, T=200 ĝis finiĝo de literoj.



Sufiĉe simpla nombrosistemo, kiu estas nepozicia (JA=AJ=11 aŭ TASK=SKTA=AKTS=321), sed plejgrave por nia celo, la numeroj fariĝas vortoj, kio permesas doni “signifon” al kelkaj numeroj. Ekzemple, en tiu sistemo, ni povas elekti la vorton PACO=70+1+3+60=134 kaj diri ke la numero 134 estas bona, bela kaj favora; sed ni povas elekti la vorton MORTO=40+60+90+200+60=450 kaj diri ke la numero 450 estas malkonvena.

Ĉar “nenio nova sub la suno” (“nihil novum sub sole”), simila sistemo estis uzata en praa Grekio, de kie estis prenata de la hebreoj, kiuj kompreneble uzis propran alfabeton. Dum zorgema trastudado de la Biblio, ili vidis numerojn ĉie kaj dum la epoko de la greklingva “Nova Testamento” ekaperis mistika sistemo pri la numeraj interrilatoj ene de la Biblio. Tiu numerigo de vortoj estis nomata “gematrio”, el la greka “geometrio”, kiu iĝis poste la nuna “numerologio”.

En la lasta libro de la Nova Testamento, skribita mistikforme, kio malfaciligas laŭvortan tradukon, eblas legi: “ĉi tie regas saĝeco. Tiu, kiu posedas komprenkapablon, kalkulu la numeron de la besto, ĉar estas numero de homo. Kaj ĝia numero estas 666”.

Ŝajne la aŭtoro volis paroli pri samtempulo, tiel ke nur inicitoj komprenu kaj samtempe evitu eblajn punojn. Oni supozas ke, tiel ke la libro estis skribita iom post granda persekuto kontraŭ la kristanoj en la epoko de Nerono, se oni skribas pere de hebreaj literoj la nomon de Nerono (“Neron Caesar”) efektive la sumo de la numeroj reprezentantaj la diversajn literojn estas 666.



Pri la numero 17, ŝajne oni diras en Italio ke ĝi portas malbonan sorton. Pro tio, ekzistas konstruaĵoj sen 17a etaĝo, hoteloj sen ĉambro 17 aŭ aviadiloj kiuj ne havas la vicon 17.

Tiun numeron oni skribas, en la romia nombrosistemo, XVII. Se oni ŝanĝas la ordon de la literoj, ni povas skribi VIXI, kies signifo en la latina lingvo estas “mi vivis”, io kio rekte signalas al morto.

Por fini, kvankam ne havas devenon el nombrosistemo, iom ni parolu pri la numero 13, kiu alportas malbonan sorton en multaj eŭropaj landoj. Estas kelkaj hipotezoj por klarigi tiom sed la plej vaste akceptata rilatas al la lasta vespermanĝo de Jesuo kun siaj disciploj, kiuj estis 12. Entute, 13 homoj kuniĝintaj ĝuste antaŭ la mortigo de Kristo. Do, numero evitinda.



Jesús M. García Iturrioz
jmgiaa@hotmail.com

